


'La Flandraj Ardenoj' estas la nomo kiun oni donis al monteta regiono en la okcidenta partc de Flandrio, 30 km sude de Gent kaj 30 km oriente de Kortrijk.

La 'Tago de la Flandraj Ardenoj' estas organizado de lokaj naturasocioj, kiuj volas konatigi la (minacatan) naturriĉecon de sia regiono al plejeble granda publiko. Lokaj ĉiĉeronoj kondukas la vizitantojn al la plej interesaj ejoj de la regiono, el kiuj multaj normale eĉ ne alireblas.

Nia grupo estas la sola ne-nederlandlingva aŭ… dank'al Esperanto la 'Flandraj Ardenoj' iĝas konataj trans (lingvaj kaj ŝtataj) limoj.

14a PARTOPRENO
DE ESPERANTISTOJ
AL LA

# TAGO DE LA FLANDRAJ ARDENOJ

**dimanĉon**
**la 23an de aprilo 2006**



organizado:
'LA KONKORDO' – KORTRIJK

S-(in)-o(j)
……………………………………………………
……………………………………………………
(nomo kaj antaŭnomo)
……………………………………………………
….. ………………………………………………
……………………………………………………
……………
(adreso)
……………………………………………………
(telefonnumero)
……………………………………………………
(retpoŝta adreso)
partoprenos kun ……. personoj(j)
(=totala nombro de personoj)
al la Tago de la Flandraj Ardenoj, dimanĉon la 23an de aprilo 2006.

Mi venos per ………………………………
…………………… (transportilo)

Mi restos la tutan tagon / nur antaŭtagmeze/ nur posttagmeze (indiku vian elekton)

Kaj ĝiros ……… x 2,5 EUR al la konto 000-0428793-53 de 'La Konkordo' – Kortrijk
(eksterlandanoj rajtas pagi surloke).

Dato:
Subskribo:

Sendu rete au poŝte al:
Piet Glorieux
Werkenstraat 56,
8610 WERKEN
T. (00 32) (0) 51 56 90 30
retadreso:
esperanto.kortrijk@esperantoland.org

## Verdaj verduloj

Lokaj naturfakuloj gvidos nian grupon nederlandlingve. Spertaj esperantistoj interpretos.

Ĉi-jare ni vizitos antaŭtagmeze la arbaron 'Kordaelbos' en Nokere kaj posttagmeze la pejzaĝon ĉirkaŭ la - en vetbicklistaj medioj fifama - Koppenberg.

Tagmeze ni – verŝajne – manĝos nian piknikon apud la Koppenberg.




## Praktike

La tago konsistas el du promenadoj (de 9h00 ĝis tagmeze kaj de 14h ĝis 17h).
Eblas partopreni nur unu promenado. Vidu la aliĝilon.

Temas pri naturpromenadoj do vi bezonos botojn (prefere!) aŭ minimume fortikajn ŝuojn! Sed ne timu: estas nek 'fakekskurso', nek 'sportkonkurso'. Konsideru tamen ke plejofte la promenado ne taŭgas por puŝĉaretoj.

La startopunktoj de la promenadoj estas plej facile atingeblaj per aŭto. Se tamen vi deziras veni trajne, eltrajniĝu en Oudenaarde sufiĉe akurate kaj nepre avertu nin!

Ni petas kotizon de 2,5 EUR (tagmeza trinkaĵo inkludita). Ebla profito iros al la 'Naturfonduso Flandraj Ardenoj'. Alportu mem vian piknikon.

Tiu kiu aliĝas antaŭ la 16a de aprilo ricevos skribe ĉiujn necesajn detalojn (inkl. vojindikojn).

**Ni limigas la nombron de partoprenantoj ĝis 40. Do ne prokrastu vian aliĝon!**



## Tri bonaj kialoj por partopreni

Unue. Malkovru la naturon en bela flandra regiono dum la plej bela sezono.

Due. Apogu la klopodojn de la lokaj naturasocioj por konservi la ekologian kaj estetikan valoron de la regiono.

Trie. Montru al ne-esperantistoj ke la Internacia Lingvo vivas.

